# PENSEO

N-ro 176

junio./2006

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro http://www.elerno.net/penseo/penlisto.htm


## Rimgratulo

### al Dekjara Donghu-a Esperanto-Domo

Guozhu

Ni vivas ĉiutage izolita
pelate de vivritmo tro rapida.
Kvankam ni — nur plebanoj tre banalaj
sen ŝarĝo de aferoj specialaj,

tamen ja mankas al ni temp' feria,
por renkontiĝi unu kun alia.
Hodiaŭ ni dediĉe per bukedo
celebras dekjariĝon de DED.

Donghu-a Esperanto-Domo kara,
ĉe verdaj montoj, apud akvo klara.
En bela loko kie lago ondas,
esperantistoj propran hejmon fondas.

Ĉiumonate ni kunsidon havas
regulan, kiu por mi ja plej ravas.
Tiam malnovaj amikoj revidas
sin, kaj elkore ĉiuj ĝoje ridas;

tiam vizitas nin jen gast' intima
trans montoj akvoj, el lok' malproksima;
tiam surprizas nin mirind-persono,
kiu inspiras pri ver', bel' kaj bono;

tiam povas intime per babiloj
diskuti ni pri lerno-malfaciloj;
tiam ni povas nin ekzerci buŝe,
ke ni interparolu ne plu fuŝe;

tiam ni povas aŭskulti novaĵojn,
revui novajn Esp-ajn eldonaĵojn;
tiam ni povas senigi soifon
al ni, glutante Esp-aperitivon.

Temppason preskaŭ ĉiam ni forgesas,
babil' ankoraŭ daŭras kaj ne ĉesas.
Bedaŭre ni disiĝas kun invito,
kaj diras reciproke: "Ĝis revido !"



2006-06-10


## DU PAPILIOJ

(laŭ la melodio de la ĉina kanto *Du Papilioj*)

**la vortoj de Hosemo**

Kara vi, memoru min.
Ni koniĝis monde pro destin'.

Tiam ni en la ĝarden'
Kiel birdoj ĝojis for de ĝen'.
Ambaŭ ni kun forta sent'
Ĉie vagis dank' al milda vent'.
Kiel ajn okazos fin',
Certe ke mi daŭre amas vin.
Kun vi mi volas kiel papili'
Libere flirti ĉe lili'.
Kiom da for-ir',
Tiom da sopir'.
Min akompanas ĉiam la suspir'.
Kun vi mi volas kiel papili'
Libere flirti ĉe lili'.
Miela memor',
Neniam ja for.
Vin ĉiam bone tenu mia kor'.



# Konsultado al Kuracisto

Mu Zi

Kvankam mi ne estas en perfecta sano, mi rare malsaniĝis denaske. Kompreneble mi vere havigis al mi nemulte da impreso pri la hospitalo, se mia onklino ne iris por korpekzameno en hospitalo tiujare.

Ŝi estas mia malproksima parenco loĝanta en mia hejmloko. Kun sep aŭ ok anoj, ŝia familio malriĉe vivas el enspezo de kelkaj kompatinde etaj te-butikoj. Tiufoje, kiam ŝi nin vizitis, ŝi surportis eluzitan vestaĵon el kruda ŝtofo, aspektante velkiĝinta. Vidinte nian strangan rigardon, ŝi klarigis, kun granda embaraso, ke ŝi ne havis sufiĉan tempon por ŝanĝi novan veston, ĉar ŝi hasteme atingis la regulan buson. Efektive ni sciis, ke estas ne decaj vestoj por ŝi ŝanĝeblaj. Kaj ŝi aldonis, ke, se la stomako neelporteble doloras al ŝi, ŝi ne riskas ĝeni nin. Ĉe tio, mi tuj konsolis al ŝi, ke mono ne estas problemo kaj ni povas pagi por ŝi.

Post manĝo, mi estis petata akcepti la taskon akompani ŝin por konsulti kuraciston en hospitalo. Kvankam iomete timante la malfacilan taskon, mi vole nevole promesis, ĉar tio estus humiliga afero por mi, se mi, kiel plenkreskinta viro, ne scius, kiel konsulti kuraciston en hospitalo.

Laŭ la malklara memoro formita en mia knabeco, kiam miaj gepatroj alportis min al hospitalo por konsulti kuracisto, mi unue kondukis mian onklinon al la registra giĉeto en la halo. Kontraŭ la bankbileto de 10 yuan de mi enŝovita por registra kosto, apunto de kelkaj monbiletoj elĵetiĝis el la giĉeto. Timante, ke mia onklino maltrankviliĝas de alta elspezo, mi hasteme enpoŝigis la apunton. Mi helpis ŝin supreniri al la kvara etaĝo laŭ zigzaga ŝtuparo, kaj fine atingis la kuracejon por internaj malsanoj post kelka tempo.

La deĵoranta kuracisto estis viro en blanka supertuto. Sur lia graseta vizaĝo sidis paro da kadritaj okulvitroj, kaj liaj okuloj ĉiam malfermemiĝis plejeble pro miaopeco. Mi helpis mian onklinon moviĝi al apuda benketo kaj sidiĝi. Mi diris, "Bonvolu ekzameni ŝin, doktoro."

Li iome turnis sian kapon, palpebrumis siajn malgrandajn okulojn kaj ree turniĝis al sia antaŭa teniĝo. Post lnga oscilado, li eligis apenaŭ aŭdeblajn intermitajn vortojn tra siaj dentoj, "Kio… kio okazas… al vi?"

Kiel malklerulino el la malproksima kamparo, mia onklino, kiu neniam spertis tian arogantecon, rapideme respondis, "Mi… mi…"

Vidante tion, mi tuj diris anstataŭe, "La stomako tre doloras al ŝi por pli ol duona jaro. En la kamparo, ŝi konsultis ĉarlatanon kelkfoje, sed neniu efiko. Bonvolu fari ekzamenadon al ŝi."

"Ĉarlatano kaj liaj drogherboj?" dirante malestime, li lerte elprenis pinĉilon el la ronda ujo sur la tablo, kaj lante siblis, "Malfermu vian buŝon."

La onklino sekvis sian ordonon, kiel obeema ŝafido.

"Pli larĝe!" Vidante ke mia onklino ne sufiĉe malgermas sian buŝon, li subite plilaŭtigis sian voĉonz kaj kriis.

La onklino pene malfermis sian buŝon ĝis la ekstremo.

Ĵetinte rigardon al ŝia buŝo, li movetis sian manon kaj, bum! la pinĉilo jam stabile stariĝis ĝuste en la ujo.

"Doktoro, nenio serioza eble, ĉu?" mi demandis duonvoĉe, atendian lian kuracistspertan agon.

Ĉe lia buŝanglo ludis tiko. Stariĝinte, li turnmalfermis la apudan kranon kaj zorgeme lavis siajn manojn, kaj sekigis ilin. Post tiu serio da agoj, li residiĝis firme, turnis sian korpon iomete kaj eligis strangan suspiron. Ĉe tio, mi tuj sentis abruptan streĉitecon kaj maltrankvilon pri mia onklino.



"Eble tio estas ordinara stomakmalsano. Mi preskribu kelkajn medikamentojn," lid iris distriĝeme.

Ĉe tio, mi eligis faciligitan suspiron. Ĵetinte rigardon al la onklino, mi tuje kapjesis, "Jes, jes, jes…"

Survoje al la apoteko por preni medikamentojn, mi pentis kaj pentadis, kial mi ne fariĝis kuracisto. Kiel simpla afero kuraci malsanon! Ĝuste tiam mia onklino alproksimiĝis kaj demandis maltrankvile, kiajn medikamentojn li preskribis kaj ĉu ili estas multekostaj. Mi respondis, ke estas nur ofteuzataj medikamentoj malmultekostaj. Por diri honeste, mi tute ne deĉifris la sencon de tiuj malorde skribitaj vortoj sur la preskribpapero.

La giĉeto de apoteko estis tiel mallarĝa, ke nur unu mano povis en- kaj elŝoviĝi. Tra ĝi elflugis atako da brua ridado kun babilado ŝajne pri gajno en loteriado. Mi riskis enŝovi la preskribitan paperon kaj post longe mi fine ricevis ĝin glitigitan el al giĉeto. Sen ekrigardi ĝn, mi enpoŝigis ĝin, ĉar mi timas, ke la onklino, kiu staras tuj apud mi, maltrankviliĝas pri la alta pago.

Malantaŭ la giĉeto, la ŝika kasistino, post lerta kalkulado, eligis koketan anoncon "kvin cent yuan". Mi surpriziĝis. Laŭ mia instinkto, mi eksentis ion fuŝitan. Kvankam mi ne konas medicinan arton, mi ankoraŭ scias, ke la prezo de medikamentoj ne povas esti tiel alta laŭrezone, se oni ne ricevas operacion aŭ skanadon per KT (Komputita Tomografio). Mi tuj demandis, "Ĉu vi eraris en kalkulado, fraŭlino?"

"Erari? Ĉu vi scipovas kalkuli? Kalkulu vi mem!" La ĵusa senkompare delikata voĉo tuj fariĝis kruda kaj sovaĝa.

Levante la preskribitan paperon ĉe miaj piedoj, mi, kiel lernanto de elementa lernejo, komencis zorgeme adicii tiujn ciferojn: kvin, dude…. ĝuste kvin cent yuan, nek pli nek malpli. Vere ŝi ne eraris en kalkulado. Ve! Probable mi estas kretano en kalkulado.

Ĉar mi malkonsentas kun tiel alta prezo, petinte mian onklinon atendi tie pacience, mi reiris al la apoteko por informiĝi pri la kialo.

Kiam mi atingis la giĉeton, jam troviĝis tie multe da homoj, kiuj atendis laŭvice por preni medikamentojn. Kun granda malagrableco en koro, mi devigite sekvis la homvicon kaj moviĝian antaŭen helike malrapide. Kiam vneis mia vico, mi endonis la preskribitan papereton, demandante diskrete, "Ĉu vi kalkulis la monsumon de medikamentoj per

neĝustaj prezoj, doktoro?”

“Ne povas esti. La prezoj de ĉi-tieaj medikamentoj estas tiaj.”

“Do…” mi fariĝis tuj senparola tiumomente.

“Nu? Ne venu ĉi tien, se vi ne havas monon! La sekvanta!” La koleremo de la apotekisto malantaŭ la giĉeto iom nereteneblis.

Tiam la sekvantaj homoj malantaŭ mi ŝajnis esti infektita de lia humoro kaj brue kriis al mi moviĝi flanken.

Saĝo elkreskis el urĝeco, kiel proverbo diris. Mi tuj ekmemoris lin, kiun mia bona kunlerninto menciis en naskiĝtaga festo. Se mi mencios lian nomon, mi pensis, tio eble efikos pli bone ol senlima kverelado. Mi tuj ŝprucis, “Doktoro Xiong, ĉu vi konas Ĉefdirektoron Wang?”

“Kiu Ĉefdirektoro Wang?” demandis li dezireme.



“Tiu de Domkonstruada Kompanio Yaxing,” mi plilaŭtigis mian voĉon, timante, ke li ne povas aŭdi klare.

“Oho, estas li! Ni ĉiam tenas boan rilaton,” li iom ekscitiĝis ĉi-momente.

“Bone, se vi estas konatoj. Bone, se vi estas konatoj,” mi tuj eĥis, sentante, ke la afero pliboniĝos.

“Estas coincide, ke mi volas aĉeti apartamenton kun tri ĉambroj kaj du salonoj en la nova loĝkvartalo, kiun li estas konstruiganta. Bedaŭrinde la prezo estas iom alta. Ĉu vi povas…”

“Kio?” mi afektis ne aŭdi klare por superruzi lin.

“Kiu el viaj parencoj li estas?” li demandis post momenteto, vidinte, ke mi ne daŭrigis.

“Mia onklo!” mi respondis senhezite, kvankam mi sentis amarecon en la koro — ba! vere humiliĝa mi estas. Kiel mi nomas mian amikon onklo!

“Aha, misskribita… Miaj fingroj sensentiĝas pro malvarma vetero. Mi mise aldonis ekstran ‘0’ malantaŭ la prezo de medikamento A.” Lia ekstrema kvieta voĉo donis fridan ektremon al mi. “Jen, tenu ĝin.”

“Ho, dankon pro via helpo.” Kun faciligita spiro, mi ricevis la papereton, sur kiu la ekstra ‘0’ estis elstrekis — oni sciu, tiu “0” farus mian onklinon perlabori pli ol duonjaron. Kiam mi pretis sin turnip or foriri, tiu ulo premis sian vizaĝon al la giĉeto, kaj entuziasme diris, “Venu al mia modesta hejmo sekvan fojon kune kun Ĉefdirektoro Wang por babili. Mia hejmo situas en la direkto tra la antaŭa pordo…”

“Oho…” mi murmure eĥis, movante miajn paŝojn.

“Fi! Kia aĉulo!” mi sakris forte duonvoĉe.

Tenante la preskribpapareton kun elstrekita “0”, mi malatenteme ĵetis rigardon malantaŭen. Malantaŭ mi troviĝis longa vico da homoj. Mi vole nevole maltrankviliĝis pri ili: oni ne scias, kiu el ili suferos de la alta pago?



elĉinigis **Elerno**

◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊

Eldonas Redakcio de ***Penseo***

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Adreso: Fremdlingva Fakultato, Nanhai Kolegio de Sud-Ĉina Normala Universitato, Nanhai, Guangdong 528000, Ĉinio

Tel: (0757) 86366253 (hejme)

E-poŝto: vejdo@elerno.net

Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.net/penlisto.htm aŭ

◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_